Jaro V * N.° 59ª

Novembro * 1908

LA SUNO HISPANA

Direktoro-Administranto ★ Director-Administrador

RAFAEL DUYOS

CIRILO AMORÓS, 28 — VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

PARTE OFICIAL

AVISO

Se recuerda á todos los señores socios de la Sociedad Española para la propagación del Esperanto, que deben remitir á esta Secretaría las cuotas correspondientes al año próximo venidero, antes del 31 de Diciembre, para tener derecho á emitir su voto en la elección de Junta Directiva para el año 1909.

El Secretario,
RAFAEL DUYOS.

En el número de Enero se publicará un balance general de ingresos y gastos por meses, correspondiente á todo el año 1908, y el número de socios que actualmente pertenecen á la Sociedad Española para la propaganda del Esperanto.

Sin abandonar su fin primordial, que el título mismo indica, esta Sociedad cree llegado el momento de derivar por un camino más útil y práctico, favoreciendo, en cuanto sus escasos recursos lo permitan, el estudio y conocimiento perfecto del idioma de Zamenhof. Tiene en estudio la organización de un Comité ó Junta de examen, que expedirá títulos que acrediten el conocimiento del Esperanto; pero éste es un asunto muy complejo y es preciso madurar detenidamente la forma de dar vida á esta aspiración sentida, desde hace tiempo, por todos los esperantistas españoles. El medio mejor sería formar un organismo por personas que, aunque elegidas por la Sociedad Española, obraran con cierta independencia y autonomía; aprobar un reglamento que fijara sus atribuciones y modo de funcionar, y, con objeto de que desde un principio tuviese vida próspera y pujante, reservarle los ingresos que ella misma obtenga por la venta de reglamentos, programas y derechos de examen, en los que esté incluído el coste del título; cuando los recursos obtenidos fuesen suficientes, podría organizar concursos distribuyendo premios en metálico y costeando la publicación de las obras premiadas. Ligar su vida económica á la de la Sociedad Española sería matar en flor tan hermosa idea; pero es preciso, para evitar esto,

facilitar los recursos necesarios para su creación sin mermar los fondos de la Sociedad Española; para imprimir los reglamentos, programas, circulares y títulos, hará falta dinero, y tal vez acudamos á una suscripción, con cuota voluntaria, solicitando el auxilio pecuniario de todos los esperantistas españoles. Pero, en fin, esto es sólo anticipar ideas que pronto expondremos con todo detalle y detención.

Por lo pronto, y para empezar á dar cumplimiento á los deseos que animan á la Junta Directiva, á todos los esperantistas que abonen la cuota correspondiente al año 1909, se les regalará un ejemplar de la obra original de D. Vicente Inglada, *Edziĝo malazanĝita.*

Nia Kongreso

En nia antaŭa numero ni sciigis al niaj legantoj la daton de la Barcelona Kongreso; tiu dato estis akceptata nur provizore, timante ke iaj neatenditaj kaŭzoj ŝanĝos la dezirojn de la organizantoj. Kaj tiel okazis; agante laŭ la dezido de la Dresdena Kongreso, ni devas organizi la *kvinan* en Ameriko kaj la *sesan* en Barcelono; sed inter la ferma dato de la unua kaj la malferma de la dua devas esti tempo sufiĉa por reveni de Ameriko en Hispanujon; tial la esperantistoj, kiuj havas sufiĉe da mono por fari tiun vojaĝon de *la nova al la malnova mondo*, ankaŭ havos sufiĉe da tempo por ĝin efektivigi. Cetere, prokrastante, kvankam nur kelkaj tagoj, nia kongreso, ni povos ĝin festi, kiam la sezono estos pli dolĉa, kaj estos pli agrable al niaj fremdaj gekongresontoj resti en Barcelona.

La dato, kiu ŝajnas pli bona estas *de la 5.ª de Septembro ĝis la 12.ª*, kaj tiu estas akceptata de nun.

* * *

Eble surprizis iun la decido organizi du Kongresojn por 1909. Sed tio estas klare pravigebla. Nia juna apostolo Edmon Privat dum sia restado en Usono faris tre fruktohavan laboron; liaj paroladoj, liaj kursoj varbis al nia afero grandan nombron da esperantistoj kaj la movado en Ameriko estas tiel eksterordinara, ke ĝi bezonas jam montri klare sian vivpotencon. Tial la Usona Kongreso estas neforĵetinda kaj neforĵetebla bezono.

Sed, en la nunaj cirkonstancoj, ĉu estus konvene pasigi du jarojn sen la granda helpo de Eŭropa Kongreso, ĉar en la Usona partoprenos nur malgranda nombro da eŭropanoj? (vidu la amerikanojn ĉeestintajn en niaj antaŭaj kongresoj ĉar ne multaj homoj povas pagi al si tiun longan vojaĝon); kaj kvankam la Usona Kongreso estos tiel sukcesplena, kiel ni deziras kaj esperas, ĉu ĝi resonos en la eŭropaj, naciaj gazetaroj tiel longe, forte kaj agrable kiel Eŭropa Kongreso?

* * *

Eble, de la venonta monato la organiza komitato komencos labori laŭfake kaj dissendos cirkulerajn leterojn al ĉiuj esperantaj gazetoj. En ĝi oni detale pritraktos ĉiujn festojn organizatajn.

Ni aŭdis, ke la Grupo Valencia intencas festi postkongreson en la *urbo de la floroj* kaj vizito al ĝia Regiona Ekspozicio, tiam okazonta.

★ ★ ★

La Kvina en Usono; alvoko al Kongresontoj!

La sciigo ke la Kvina okazos en Usono kaŭzis grandan ĝojon inter la ĉi-tieaj Esperantistoj kaj samtempe multe surprizis nin. Kvankam ni bone konas ke Chautauqua, la urbeto elektita por la kongreso, estas unu el la plej taŭgaj lokoj en la mondo por tiaj kunvenoj, ni apenaŭ esperis ricevi tian grandan honoron de la eŭropaj esperantistoj, pro la granda interspaco inter la du kontinentoj, la kosto de la vojaĝo kaj la tempo necesa por viziti Usonon.

Tamen ni tre fieras pro la honorego kaj deziras certigi ke la Esperantistoj kiuj faros la viziton neniel bedaŭros ĝin.

Kompreneble ĉiuj Eŭropanoj jam multon aŭdis pri la diversaj mirindaĵoj, naturaj kaj artefaritaj, videblaj en Ameriko, kaj amus ilin vidi. Al tiuj esperantistoj kiuj povos iamaniere aranĝi ĉeesti ĉe la Chautauqua kongreso, ni urĝe petas ke ili tion faru. Ne nur vi ĝuos la plej interesan kongreson en la historio de esperantismo, en la plej fama kunvenloko de Ameriko, sed sin prezentos la okazo vidi la mondfamam akvofalon «Niagara», kaj la famajn «Thousand Islands», (Mil insuloj) de la grandega rivero St. Lawrence, apud Chautauqua. Troviĝas ankaŭ multaj aliaj belaĵoj, kiel la Yellewstone Nacia Parko, Grandega Kanjono de la Colorado, la Granda Sallago de Utah ŝtato, kaj multaj aliaj. Bedaŭrinde tiuj lastaj belaĵoj sin trovas tre malproksime unu de la alia kaj multe da mono estas necesa por ilin viziti. Se iuj decidos viziti la pacifikan marbordon,—kaj ni esperas ke multaj tiel decidos—ili vidos la plej interesan parton de Usono. Tie ĉi la klimato estas milda, la tero tre fruktodona, la loĝantoj tre gastamaj kaj ni havas la plej belajn montojn, lagojn, naturajn parkojn, mirindan golfegon (Puget Sound), ankaŭ la plej grandajn arbojn en la tuta mondo (Sequoia Gigantea de California ŝtato. En Seattle tiun someron okazas granda ekspozicio, kiu sola indas la longan vojaĝon de Chautaqua.

Ankoraŭ estas tro frue multon diri pri la preparoj farotaj por la kongreso mem, sed la nove fondita Esperanta Asocio de Nordameriko jam komencis klopodi pri la aranĝoj, kaj ĉar ĝiaj estroj estas kapablaj kaj energiaj, neniu povas dubi pri la sukceso de la afero. Cetere ni havas la povegan helpon de la granda Chautauqua Institucio, la plej grava organizaĵo por la meminstruado en la tuta mondo; ĉar tiu societego havas filiojn ĉieajn en Usono, kaj ĉar ĝiaj regulaj kursoj nun enhavas Esperanton, multegaj sendube komencas akiri la lingvon kiuj alie kredeble neniam interesiĝus.

La kongresejo ĉe Chautauqua perfekte taŭgas por la celo kaj facile akomodos la plej grandan aronda vizitantoj, sed ĉar en aliaj ĵurnaloj baldaŭ troviĝos plenaj sciigoj pri la bela urbeto, ne necesas tie ĉi priskribi ĝin.

Ni estas feliĉaj konstati ke la novaĵo pri la venonta kongreso jam vekis multe da intereso ĉie en la lando kaj Esperanto faros grandan antaŭenpaŝon en Usono dum la proksimaj monatoj.

CHARLES E. RANDALL.



La persekutanto

Tute tegita per la klasika hispana mantelo, ekŝirante per siaj bruegaj paŝoj la noktan silenton, marŝante rapide, kiel tiu forkuranta de danĝero aŭ deziranta alveni plej frue kiel eble en ian lokon, belkreska kavaliro, kies nomon mi ne devas skribi, trapasis la senhomajn stratojn de la ĉefurbo. La densa mallumeco nek timigis nek dubigis lin pri la sekvota vojo; la rapidiranto kuraĝe antaŭeniris kaj nur haltis momente en la stratkrucejoj dekstren kaj maldekstren rigardante, ŝajne pro timo al ia neatendata renkontiĝo.

Kiam li preterpasis lanterneton pendantan antaŭ ia sanktula figuraĵo, li kaŝis ankoraŭ pli sian vizaĝon. Oni dirus, ke li estis konspiranto kaŝe iranta al la klubo aŭ eliranta el ĝi, kaj eble la opinio ne estus erara, ĉar en la fino de tiu jarcento la duono de la madridaj loĝantoj konspiris kontraŭ la alia duono.

Nur unu fojon li trovis barita la vojon. Noktaj muzikistoj ludantaj mandolinojn kaj gitarojn kantis amajn strofojn antaŭ krado, post kies kurtenoj eble sin kaŝas ia amatino. En alia loko kaj horo, mi vetas ke nia kavaliro ne timus la renkontiĝon, kvankam li estus devigata trabori la homan barilon per sia kuraĝa glavo kaj fini sange la aman serenadon,—kio estis tiam tre ofta,—sed prudente, kvankam malplezure, li elektis alian pli trankvilan straton.

Tio pasigis lin antaŭ antikva kaj senarta domego, super kies pordo staras ŝtona blazonŝildo kaj koincide, kiam li preterpasis ĝin, la pordo duone malfermita rapide fermiĝis kvazaŭ ia elironto ankaŭ dezirus ne esti vidata nek rimarkata. Al nia kavaliro ŝajnis aŭdi murmuron de virinaj voĉoj mallaŭte parolantaj kaj eble li pensis, ke vidate de neniu li tamen vidos, kiuj estas la surprizataj virinoj; tial alveninte en malluman angulon li kaŝis sin.

Li ne atendis multe. Malferminte la pordon, unu post alia du virinoj eliris tra ĝi tre timeme; resonis la noktaj eĥoj pro la brua pordfermo kaj la du elirintinoj senatente ekmarŝis kaj pasis preter la kaŝejo de la kavaliro. Ne malfacile, sed neeble estis diveni, kiujn tegis tiuj nigraj, longaj manteloj, ĉar nur sub ĝia suba rando oni vidis moviĝi malgrandajn ŝuetojn; sed..... per la ŝuetoj oni imagas la veston, kaj per la vesto oni imagas, se ne la personon almenaŭ ĝian rangon, kaj trafe la kavaliro pensis ke la ŝuetoj subtenis altrangulinojn. Pli malproksimen flugis ankoraŭ lia fantazio, antaŭvidante okulojn, grandajn kiel sonĝitajn de poeto, nigrajn kiel senluna nokto kaj buŝojn faritajn de anĝelo por taŭgi kiel nesto de kisetoj. La allogo de nekonata aventuro trenis lin post la virinoj.

Baldaŭ ili rimarkis la postiranton kaj silente rapidigis sian marŝon; ankaŭ li plirapidigis la sian kaj kiam sukcesis alproksimiĝi, ĝentile demetante sian ĉapelon kaj forgesante la timon esti vidata, li diris per amema sed vibra voĉo:

—Mi proponas al la noktirantaj belulinoj mian brakon kaj mian glavon; vi ne povas sendanĝere iri.....

—Dankon, tutkoran dankon—diris arĝenta voĉo—plej bonan servon vi faros se vi lasos nin solaj.

Sed li ne faras tion; li, kun nobla koro kaj de nobela sango ne forlasas du virinojn tiel riske elmetitajn al danĝeroj de la nokto, kaj spite ilia deziro, li postsekvos la ŝuetojn ĝis la ĉielo, ĉar nur en la ĉielo havas taŭgan lokon beleco tiel ĉarma kiel la ilia. Kiu scias ĉu ili bezonos defendanton por liberiĝi de kanajloj aŭ ŝtelistoj kaj tiam bedaŭros la mankon de kuraĝa glavo? Por tio estas en la mondo kavaliroj kaj certe li ne preterlasos la okazon plenumi sian devon.

La virinoj jam nenion respondis, sed la silento mem ekpikis ankoraŭ pli lian scivolemon; li ĵuris al si sekvi la aventuron ĝis la fino, kia ajn ĝi estos.

Kaj tiam komenciĝis vera persekutado tra la ĉefurbaj stratoj. La mantelulinoj ĉiam silente rapidis plej eble kaj faris mil ĉirkaŭirojn celante senigi sin de tiu akompananto, sed vane! Eltirante profiton el la mallumo kaj stratkruciĝoj ili sukcesis vidi sin solaj dum mallongedaŭra momento, sed baldaŭ la bruaj paŝoj kaj la gaja parolado de la kavaliro komprenigis ilin pri la senutileco de ilia peno. Ĉio perdita! La afero jam estis vere ĉagrena, kaj eĉ ili estus preferintaj renkonti ŝteliston ol tiun nekonatulon tiel serveman. Kion fari, Dio mia!

Sendube la plej altkreska el ili ekpensis solvon al tiu problemo:

—Al Sankta Mario!—ŝi diris mallaŭte.

Kaj per novaj ĉirkaŭiroj, ili alvenis placon kaj malaperis tra la malfermitaj pordoj de malgranda preĝejo. Tiam la problemo estis por la kavaliro, kiu haltis ne sciante, ĉu li daŭrigos la persekutadon en tiu sankta loko aŭ ĉu ne estos pli dece atendi en la strato ilian eliron.

Sed subite li rememoris, ke la preĝejo havas alian pordon turnitan al mallarĝa strato kaj tien li kuris tiel ĝustatempe, ke li ankoraŭ ekvidis ĉe la fino de la strateto la nigrajn mantelojn, kiuj de preskaŭ unu koro kuris antaŭ li.

—Estas senutile, miaj belulinoj. Kiam mi estis ordenata Kavaliro, mi ĵuris zorgi kaj protekti gemalfortulojn kaj, kio estas pli malforta ol du virinoj irantaj noktomeze tra tiuj senhomaj stratoj?

Tio jam estis nesuferebla kaj verŝajne ili riskis iri hejmen; la ĉirkaŭiroj por foriĝi de la persekutado sendube malproksimigis ilin de la vera vojo, kaj iom ne tiel rapide sed kun la rezignacia sintenado de tiu devigata fari ion kontraŭvole, ili sin direktis al la okcidenta parto de Madrido. La penso, ke la fino de la aventuro jam estas proksima, incitis ankoraŭ pli la persekutanton kaj lia koro forte batis en lia brusto. Sed, ĉu ili eliros el Madrido kaj eniros la kamparon?

Ne; jen ili haltis, surprizante la kavaliron, antaŭ flanka pordeto de la reĝa palaco. Potenca Dio! La sama arĝenta voĉo, kiun li aŭdis antaŭ unu horo, elsilabis signaldiron kaj la pordeto malfermiĝis rapidege. Jen la fino de la aventuro! Sed ne; li ĵuris akompani ilin ĝis la rando de la mondo kaj en tiun randon ankoraŭ ili ne alvenis. Kaj antaŭ ol la pordeto fermiĝis jam li estis interne.

La hispanreĝa palaco estas grandega. Li bone konis ĝin kaj komprenis ke tie la persekutado ankoraŭ estos pli malfacila ol en la stratoj.

Tra la longaj koridoroj kaj mallumaj ŝtuparoj la tri nigrevestitaj estaĵoj kuris per ĉiuj siaj fortoj. Tio ne daŭris malmulte; unu el ili malfermis rapidege pordeton kaj enŝlosis sin; tio komprenigis la kavaliron ke li perdus la batalon se la alia agus same kaj tre avide li kuregis post ŝi.

Malsuprenirante mallarĝan ŝtupareton, li sukcesis palpi ŝian mantelon, sed vidante ŝin tiel proksiman kaj pensante, ke eble, malgraŭ tio, li ne sukcesos malkovri ŝian sekreton, li elpensis frenezaĵon, pardonindan post du horoj da senfrukta persekutado.

Li etendis la manon kaj pinĉis..... la parton de ŝia korpo, kiun la suprenirado igis plej proksima al li.

—Kavaliro, tio estas nesuferebla; for de tie ĉi vi povis agi laŭvole, sed tie ĉi, krom la respekto, kiun la loko postulas, vi ne devis forgesi ke ne estas pinĉindaj virinoj. Eĉ vi kuraĝis pinĉi min, vian Reĝinon. Kion vi pensas pri tio?—diris la jam de li konata voĉo, ne tre kolerŝajna.

—Sinjorino,—li diris—mi nur pensas, ke se via Reĝina Moŝto havas tiel malmolan koron kiel..... tion, kion mi pinĉis, mi estas tujmortonta homo!

Rafael Duyos. (1)

(1) Verŝajna estas tiu anekdoto, kiun mi aŭdis el aŭtoritaj buŝoj kaj eĉ legis ie, sed nek rakontantoj nek verkistoj parolas pri la samaj reĝino kaj kavaliro. Tial mi ĝin verkis fantazie sub vera fundamento, sed silentas pri la epoko kaj personoj.

¿Por qué no leen?

El éxito del primer Congreso Esperantista celebrado en Boulogne sur-Mer resonó favorablemente en las prensas nacionales, hasta entonces, con raras excepciones, escépticas ó impugnadoras. Enardecidos por el triunfo, aprovecharon los esperantistas la favorable ocasión para dar mayor impulso á su propaganda, y se multiplicó el número de adeptos y se dobló el de grupos en plazo brevísimo; ávidos de trabajo, entraron muchos en los campos de las literaturas nacionales y transplantaron al nuestro, correctamente traducidas, las obras que en su patria mayor fama alcanzaron. Espontáneamente aparecieron buen número de obras originales y transformóse, como por arte de encantamiento, lo que antes era ralo plantío de humildes esquejes, en exuberante floresta.

No faltaron en España esperantistas de buena voluntad que quisieron seguir ese ejemplo y, como siempre, en empresas de riesgo y empeño, D. Augusto Jiménez Loira se lanzó denodadamente á la pelea. El, que fundó este periódico, LA SUNO HISPANA, cuando el número de esperantistas españoles garantizaba un *déficit* espantoso; él, que siempre halló recursos para sostener en su primera época el naciente grupo de Valencia, él fué también el primero que se aventuró á publicar algunas obras en Esperanto. No le preguntéis por el resultado financiero de su empresa, negativo hasta el día; pero su intrepidez es tanta que, á pesar de eso, anda hoy de cajista en cajista, corrigiendo las pruebas de una notable traducción de *La perfecta casada*, que pronto verá la luz pública.

Pero el entusiasmo es contagioso, y D. Augusto contagió á dos esperantistas que concibieron un magnífico plan: sacrificar por el Esperanto y por el buen nombre de nuestra patria un puñado de pesetas, publicando progresivamente nuestras joyas literarias en el idioma de Zamenhof. Esta progresión no estaba sujeta á ley matemática alguna, pero sí lo estaba á la ley comercial siguiente: publicar un tomo; en cuanto el producto de la venta lo consintiera, editar una segunda obra y publicar la tercera cuando la venta de las dos anteriores diera lo necesario, es decir, destinar todas las ganancias á la publicación de nuevas obras. Así llegaron nuestros héroes á publicar el *Quijote... in mente.*

¿Se van á malograr tan buenos propósitos? Mucho es de temer. Hasta ahora la progresión no pasa del primer término; publicóse *Prozo kaj versoj* y el número de ejemplares vendidos es aterrador por su pequeñez; todo esperantista español tiene en cartera la traducción de alguna obra, pero todos ó casi todos se ven imposibilitados de darla al público, y únicamente el medio antes expuesto podía realizar paulatinamente todos esos proyectos en gestación. Pero hay que predicar con el ejemplo y acoger con benevolencia las obras publicadas; el sacrificio pecuniario que se exige es muy pequeño. *Prozo kaj versoj* puede adquirirse por dos pesetas.

En gran número recibimos cartas correctamente escritas en Esperanto; esto prueba que hay muchos esperantistas en España, capaces de saborear las bellezas literarias de nuestro idioma. Y ¿por qué no leen?—Pregunta es ésta á la que no sabemos contestar nosotros.

A cada uno de nuestros suscriptores nos atrevemos á suplicarle encarecidamente la adquisición y propaganda de *Prozo kaj versoj*, excelente libro de lectura y traducción. Si se activa la venta y aumenta la recaudación, pronto podrán leer en el idioma de Zamenhof una de las mejores obras de Jacinto Benavente.

★ ★ ★

Bibliografio

Ĉu li?, romano originale verkita de D.ro Vallienne. Unu volumo in 12, 447 paĝa. Prezo: 4 frankoj. Librejo Hachette kaj K.o, Parizo.

D.ro Vallienne, eminenta tradukinto de *Eneido*, faris sian unuan provon, kiel originala romanverkisto per la bela *Kastelo de Prelongo*, kiun ni siatempe raportis kaj laŭdis en tiu ĉi gazeto, kaj kuraĝigita de la granda ricevita sukceso, li prezentas al ni sian duan duvortetitolan romanon *Ĉu li?* Tiu ĉi verko enhavas tre korektan, fluan kaj elegantan esprimadon kaj al tio kuniĝas intereso en la argumento kaj lerteco en ĝia disvolvo. Tial, oni ne bezonas esti profeto por antaŭvidi la ŝaton kiun difinos al *Ĉu li?* ĉiuj Esperantistoj. Se ni aldonas, ke en *Ĉu li?* oni konstatas tre ŝatindan progreson de la aŭtoro pri la romanverkado, oni fine bone komprenos la meriton de tiu ĉi nova produktaĵo.

Krom ĉio dirita estas tre agrable al ni raporti al la legantoj, ke D.ro Vallienne suferas malsanon, kiu devigas lin ne eliri el domo, kaj li uzas sian tutan tempon por Esperanto verkante tiajn belajn librojn, kiuj tiel multe kunhelpas al la rapida triumfo de nia esperanta literaturo. La konduto de D.ro Vallienne, tiel nobla kaj fidela al Esperanto, vere nin kortuŝas kaj lia abnegacia ekzemplo estas vera konsolo por tiuj, kiuj bedaŭras la farojn de aliaj eminentaj Esperantistoj koncerne Idon. Kaj oni ne povas nei, ke D.ro Vallienne klopodas kiel eble plej kontraŭ la malbenindaj reformoj, ĉar per la amasiĝo de novaj kaj novaj verkoj li tre konvinke pruvas la taŭgecon de la nuna Esperanto. Oni nur sciu, ke D.ro Vallienne verkis originale *Kastelo de Prelongo*, *Evolucio de la religia ideo*, *Por kaj kontraŭ Esperanto*, *Ido kaj Esperanto* kaj faris aŭ pretigas la tradukojn de *Eneido*, *Metamorfozoj*, de Ovidio, *Paco kaj milito*, de D.ro Charles Richet, *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia (en franca lingvo)*, *Kaprico*, *unuakta komedio de Musset*, *Oni neniam pri io devas ĵuri*, triakta komedio de Musset, *Manon Lescaut*, *Aventuroj de Telemako*, *La Martiroj*, de Chateaubriand k. c., kaj oni nur diru, ĉu ne estas ridinde, ke ia gazeto, certigas ke Esperanto estas netaŭga kaj malaperonta. Dum ekzistos tiaj Esperantistoj, kiel D.ro Vallienne, Esperanto ne mortos, ne malaperos. Saluton kaj longan vivadon, majstro Vallienne, por ke vi liveru multajn glorajn verkojn al Esperantistoj!

Frazaro, de Henri de Coppet, Profesoro diplomita de Esperanto, unu volumo 106 paĝa, in 16, Esperanta Kolekto de «La Revuo». Prezo: 1 fr. Librejo Hachette kaj K.o

Tiu ĉi verko enhavas kolekton da pli, ol 1800 frazojn en Esperanto pri la plej oftaj bezonoj de la vivo. La frazoj estas preskaŭ ĉiuj prunteprenitaj el la famaj konversacilibroj, kiujn S.ro Guérin, eldonisto en Parizo, publikigis en diversaj lingvoj, kaj rekomendas sin per sia granda simpleco kaj utileco. Tial S.ro Coppet, lerte tradukante esperante tian belan kolekton da frazoj, faris al nia lingvo grandan servon, ĉar lia *Frazaro* esperante verkita, estos tre utila al ĉiuj profesoroj de Esperanto, tiel por elementaj, kiel por superaj kursoj.

Firmo Hachette ankaŭ publikigis alian eldonon duobleampleksan de tiu ĉi verko, kiu sub la titolo: *Recueil de phrases, edition française esperanto du «Frazaro»*, estas vendata je la prezo de 1'80 frankoj, kaj kiu enhavas la saman tekston de «Frazaro», kune kun ĝia franca traduko.

Du mil novaj vortoj, ĉerpitaj el la Verkaro de D.ro L. L. Zamenhof netroveblaj en Universala Vortaro kun sep naciaj tradukoj kaj referencoj montrantaj la lokon,

kie ĉiu vorto troviĝas, ellaboris Paul Boulet, Sekretario de la unua kongreso de Esperanto kaj profesoro de Esperanto, verko kontrolita de la Lingva komitato. Unu volumo in 16, 96 paĝa. Esperanta Kolekto de «La Revuo». Prezo: 1'50 frankoj. Librejo Hachette kaj K.°

La sola titolo de tiu ĉi verko, kiun oni povas konsideri kiel *Komplementon de Universala vortaro aŭ kiel Zamenhofan ekster-Universalan Vortaron*, kaj kiu estas plivalorigita de bela antaŭparolo de S.ro Th. Cart, montras ĝian enhavon kaj celon. Nebezone estas prilaŭdi ĝin Ĝi enhavas la tradukon de la du mil novaj vortoj en la lingvoj franca, angla, germana, hispana, itala, rusa kaj pola, kaj estas tiel necesega al ĉiu Esperantistoj, ke ni kredas, ke sen ĝi oni ne povas ĝuste scii la fundamenton de la uzado de tiuj ĉi novaj radiko, kiun D.ro Zamenhof proponis al ni en siaj verkoj.

Laŭroj, kolekto de la originalaj verkoj premiitaj en la unua literatura konkurso de «La Revuo». Unu volumo, in 8, 188 paĝa. Prezo: 2 frankoj. Esperanta kolekto de «La Revuo». Librejo Hachette kaj K.°, Parizo.

Verko kun tia titolo ne bezonas komentarion.

Bukedo, ses artikoloj pri literaturo kaj lingvistiko de Charles Lambert. Unu volumo in 8, 157 paĝa. Prezo: 2 frankoj. Espereranta Kolekto de «La Revuo». Librejo Hachette kaj K.°, Parizo.

Malgraŭ, ke la aŭtoro modeste diras en sia *antaŭparolo*, «karaj legontoj, ne tro iluziu vin pri la titolo Bukedo», mi, tamen, povas certigi vin, karajn legantojn, ke la titolo «Bukedo» estas tre ĝusta kaj justa. La aŭtoro prezentas tre belan esperantan tradukon de ses vulgarigaj paroladoj, kiujn li iam faris estante «maitre de conferences» pri klasika filologio kaj gramatiko, kaj kies titolo estas: *Loko de pilgrimo kaj mirakloj en Grekujo*, *Sakuntala kaj hinda teatro*, *La belulino, kiu dormadis en arbaro kaj la feinaj fabeloj*, *Vorto kaj ideo*, *Vivo kaj morto de lingvo*, *Internaciaj lingvoj*. Tiuj ĉi paroladoj presitaj grandaparte en «La Revuo» estas tre interesaj kaj posedas tiun ĉarman esprimadon, kiu igas la legantojn, tralegi la tutan verkon per unu sola fojo. Tial, ni ne timas varme ilin rekomendi al niaj legantoj, eĉ tiujn, kiuj ne ŝatas multe lingvistikajn kaj gramatikajn aferojn, en la certeco, ke ĝuante la belecon kaj parfumon de «Bukedo» *ili tro iluziinte sin* ne ricevos disreviĝon.

Muzika terminaro, de J. de Ménil. Unu volumo in 8, 20 paĝa. Prezo: 0'60 frankoj. Esperanto, teknika kolekto. Librejo Hachette kaj K.°, Parizo.

Kiel Esperanta muzikisto, S.ro de Ménil estas la unua kompetentulo, ĉar liaj multaj belaj muzikverkoj donis al li tre justan glorfamon. Lia verko «Muzika terminaro» malgraŭ la modesteco de sia nur 20 paĝa amplekseco, ne estas sendube ia bagatelo, sed kontraŭe vera juvelo de la teknika vortaro. Estas neeble verki la muzikan terminaron pli simple, precize kaj ĝuste, ol li faris, kaj tiu ĉi verketo tiel malmultepaĝa, estas kiel la malnova «*vocabulaire des mots specciaux á la philatelie de R. Lémaire*», vera modelo de teknika vortareto, kiun plej profitdone imitos ĉiuj teknikaj vortaristoj.

Aspazio, tragedio en kvin aktoj de Aleksander Svjentoĥovsky, el pola lingvo tradukis, D.ro Leono Zamenhof. Unu volumo in 8, 157 paĝa. Prezo: 2'50 frankoj. Esperanta kolekto de «La Revuo». Librejo Hachette kaj K.°

D.ro Leono Zamenhof, kiel frato de la elpensinto de Esperanto, povis ĉerpi Esperanton el la fonto mem, kaj tial akiri tian majstran stilon esperantan, kiu karakterizas tiun gloran aron da polaj Esperantistoj—verkistoj, nome Kabe, Leo Belmont, A Grabowski, k.c., tiu stilo tiel simpla kaj ĉarma, kiel imitinda kaj nekaptebla. La leganto povas ĝui ĝin en la paĝoj de *Aspazio*. Tio ĉi estas la plej bona laŭdo por la esperanta teksto. Pri la originalo mi ne povas fari ion pli bonan,

ol kopii la jenajn liniojn, kiu montras la opinion pri *Aspazio*, esprimitan en *Postparolo*, de S.ro Leo Belmont:

«En la dramon «Aspazio» la kreinto enmetis tutan sian animon—ĉiujn sonĝojn »de idealo, ĉiujn batalojn de eterne revolucia spirito, tutan sian amon al beleco kaj »malamon al malnobleco. Vi trovos en la figuro de Periklo sonĝon de Svientoĥovski »pri homo, kiu regas animojn ne per privilegia posteno, ne per demagoga flatado »de instinktoj de amaso, sed per pura potenco de persona genio—bela sonĝo, »momente enkorpigita en Hellado, tiel kara al Svientoĥovski. Vi trovos en Aspazio »idealon de virino—belan saĝecon kaj saĝan belecon. Vi trovos ĉi tie rondon de »elektitaj spiritoj de Hellado kaj malkovros en Fidio, Sofoklo, Eŭripido—aŭtoran »amon al arto ĉiuspeca, en Anaksagoro, Sokrato—lian amon al filozofio, en »Protagoro—lian senkomparan talenton dialektikan—kaj en tuta dramo perlojn de »malvarma penso filozofa kaj rubenojn de varma kredo je venko de grandaj koroj »kaj animoj geniaj.»

Tutmonda jarlibro Esperantista enhavante la adresaron de D.ro Zamenhof por 1908. Uno volumo in 12, 216 paĝa. Prezo: 2 frankoj. Librejo Hachette kaj K.o

Verko utilega al ĉiuj Esperantistoj kaj enhavanta plej praktikajn kaj profitdonajn sciigojn pri la esperantista movado.

L. L. Zamenhof. Fundamento de Esperanto, tradukita laŭ la permeso de la aŭtoro de D.ro G. R. kaj D. M. kun la patronado de la «Rumana Esperantista Societo». Prezo: 1 fr. Librejo Hachette kaj K.o

Tiu ĉi verko estas la rumana eldono de *Fundamento de Esperanto.*

Traduzione italiana de «Ekzercaro», de S.rino Rosa Junk. Unu volumo in 16, 32 paĝa. Prezo o'60 frankoj. Librejo Hachette kaj K.o

Ĝi estas la itala traduko de «Ekzercaro» de D.ro Zamenhof.

Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe, el germana lingvo tradukis D.ro L. L. Zamenhof. Librejo Hachette kaj K.o 79, Boulevad St. Germain, Paris aŭ Esperanto Verlag Möller & Borel, 95 Prinzenstrasse, Berlin.

Ĉiuj Esperantistoj, kiu havis la feliĉon alesti al la 4.a kongreso de Esperanto en Dresdeno, povis ĝui la ĉarmojn de tiu belega kaj altpoezia dramo. Ĉiuj malfeliĉuloj, kiuj tie ne estis, havas almenaŭ la konsolon tralegadi ĉiomfoje, kiomvole la senkomparan versan tradukon de *Ifigenio en Taŭrido* faritan de D.ro Zamenhof kaj kies plej bona laŭdo estas diri—kiel prave asertis S.ro Cart—ke la traduko estas inda je la originalo.

La Psalmaro, el la Biblio, el la originalo tradukis D.ro L. L. Zamenhof, kun antaŭparolo, klarigoj kaj notetoj pri la hebrea muziko de F. de Ménil. Librejo Hachette kaj K.o Paris. Prezo:

La meritoj de tiu ĉi teksto estas de ĉiuj plej konita, kaj la altvaloro de la traduko, rekte farita el la originalo, estas ankoraŭ senduba pro la kompetenteco de la tradukinto. Nur sufiĉas legi kelkajn liniojn por ekkrii *ex ungue leonem*: tiu ĉi verko nur povas esti verkita de la aŭtoro de *Hamleto*, *La Revizoro*, *La Rabistoj*, k.c., kaj nur unu demandon al sinjoroj amantoj de reformoj: ĉu *Ifigenio en Taŭrido* kaj *Psalmaro* ne konvinkis vin, ke via revita perfekteco estas nur sencela elspezado de tempo, kiu estas oro, laŭ la angla proverbo?

Shakespeare. Makbeto, tradukita de D. H. Lambert, B. A. Oxford. Fratulo de la Brita Esperantista Asocio. Esperanto. Kolekto de «La Revuo». Librejo Hachette kaj K.o Paris. Prezo:

Kiel oni tre bone scias, la angloj sentas varman admiron, pli bone, kvazaŭ dian superŝaton al sia majstraŭtoro Shakespeare, patro de la angla teatro. Tial, en patrujama celo, tre prava kaj aplaŭdinda, ili decidis liveri al ni la esperantan tradukon de la tutkolekton da verkoj de tiu mirinda teatraŭtoro. Tion ĉi diris al mi neniu, sed konstatante la ĉiutagan aperon de la Shakespearaj produktaĵoj oni povas tuj tion diveni. Kaj sendube la senmorta aŭtoro ne povas plendi pri la merito de la tradukoj, ĉar ĉiuj estas tute indaj de la originaloj. Komencante per *Hamleto*, kaj daŭrigante per *La Ventego*, *Julio Cezaro* kaj *Makbeto*, oni povas certigi, ke estas vera ravo tralegi la esperantajn ĵusnomitajn tradukojn. Niajn korgratulojn, do, al S.ro Lambert, kiun ni demandas: kiu sekvos Makbeton? Ĉu *Otelo*? Ĉu *Romeo kaj Julieto*? Ĉu...?

V. INGLADA.

SECCION GRAMATICAL

R. S.—Como precisamente me hace usted una consulta que el Dr. Zamenhof ha resuelto magistralmente en sus famosas *Contestaciones* de *La Revuo*, me limito á copiarle, traducido, cuanto él expuso sobre ese punto:

«Sobre las expresiones *jam ne...* y *ne... plu.*—En muchísimos casos las dos me parecen igualmente buenas y no hay razón alguna que nos obligue á decir: usad *solamente* la primera, ó solamente la segunda de esas expresiones. ¿Por qué despojarnos innecesariamente en tales casos de esa libertad, cuando en ella no hay ningún inconveniente? Sin embargo, no *siempre* son sustituíbles esas expresiones. Por ejemplo, en lugar de *ne parolu plu* no podemos decir *jam ne parolu.* Dar una explicación precisa sobre esas voces indefinibles, como *jam* ó *plu*, es muy difícil y se podría caer en error; por eso me limitaré á dar una aclaración *aproximada*, no garantizando que sirva para todos los casos. *Jam*, según mi opinión, contiene efectivamente la idea de cambio de estado, como demostró *British Esperantist*; *plu* encierra idea de duración; *jam ne* puede también referirse á algo que anteriormente no existía y que fué solamente intentado ó esperado; *ne plu* se refiere á algo que existió con anterioridad. Por ejemplo, si yo nunca he visitado á usted y sólo intenté hacerlo, puedo decir *mi jam ne vizitos vin* (si he cambiado de intención), pero *mi vin ne vizitos plu* lo podré decir solamente, en el caso de que hubiese visitado á usted con anterioridad...»

Corto aquí la *Contestación* del Doctor, porque lo demás que añade no se refiere ya al punto por usted consultado.

Sciigoj

EL HISPANUJO

La respektinda prezidanto de Hispana Societo, S.ro Román Ayza daŭrigas en Madrido la lertan kaj fruktoplenan propagandon, kiun tiel fervore li faris en

DE ESPAÑA

El respetable presidente de Hispana Societo, D. Román Ayza, continúa en Madrid la ventajosa y fructífera propaganda, que tan fervorosamente hacía en

Valencio. Li komencis kurson en la Supera Milita Lernejo, kie, ni esperas, li faros kelkajn lertajn esperantistojn.

Valencia. Ha empezado un curso en la Escuela Superior de Guerra, donde—así lo esperamos—formará algunos buenos esperantistas.

En la nova kaj vasta loĝejo de la Valencia Grupo komenciĝis fervore la vintraj laboroj. La kurson por virinoj klarigas S.ro Bellido kaj S.ro Novejarque tiun por lo viroj; en ambaŭ ĉeestas multaj gelernantoj. Ankaŭ S.ro Bellido klarigos kurson en la Societo de katolikaj metiistoj, kiu estis malfermata per solena kunsido kaj parolado de nia direktoro S.ro Duyos. La prezidanto de la Grupo S.ro Vicente Inglada, kun sia majstra kompetenteco, klarigas superan kurson, kiu esperigas kontentigajn fruktojn.

En el nuevo y amplio local del Grupo de Valencia, han empezado con fervor los trabajos de invierno. Dirige el curso para señoritas el Sr. Bellido, y el de los socios el Sr. Novejarque; á los dos asisten muchos alumnos. También el Sr. Bellido explica un curso en la Sociedad de Obreros Católicos, que fué inaugurado con una solemne sesión y conferencia de nuestro director Sr. Duyos. El presidente del Grupo D. Vicente Inglada, con su magistral competencia, da un curso superior que hace esperar halagadores resultados.

La venontan jaron okazos en Valencio granda Regiona Ekspozicio, kaj la tieaj esperantistoj pensas utiligi ĝin por agrabligi la restadon al kongresistoj farontaj ekskursojn al tiu bela urbo.

El año próximo, se celebrará en Valencia una gran Exposición Regional, y los esperantistas valencianos piensan utilizarla para hacer agradable la estancia de los congresistas que hagan una excursión á dicha hermosa ciudad.

Tre kredeble, dank' al la fervoraj klopodoj de S.ro Modesto Millán baldaŭ aperos nova grupo en Alcañiz (Teruel),

Probablemente, gracias á los constantes trabajos de D. Modesto Millán, pronto aparecerá un nuevo grupo en Alcañiz (Teruel).

S.ro Paŭl Linares (H.to S. Basilio, *Córdoba*) presigis elegantan cirkuleron, kiun ili dissendis multenombre (2.500 ekzempleroj) en la Andaluzia regiono. Tio elvekis intereson en la gazetaro kaj ni rimarkis la esperantiĝon de multaj personoj dank' al tiuj cirkuleroj. Koran gratulon kaj dankon!

D. Pablo Linares (H.to S. Basilio, *Córdoba*), ha editado una elegante circular, que ha sido distribuída copiosamente (2.500 ejemplares) en la región andaluza. Esto ha despertado interés en la prensa y hemos notado que muchas personas se han hecho esperantistas gracias á esas circulares. ¡Cordial felicitación y agradecimiento!

La Grupo de San Sebastián elektis novan direktan komitaton; jen ĝia nomaro:

El Grupo de San Sebastián ha elegido nueva junta directiva; he aquí los nombres:

Presidente: D. Alberto Velasco.—Vicepresidentes: Srta. Inés Erviti y D. Angel Digón.—Secretario: D. Martín Heredia.—Bibliotecario: D. Pablo Sanromá.—Cajero: D. Clemente Ufano.—Vocales: D. Florencio Galilea, D.a Antonia de Digón, D. Antonio Tuduri y D. Blas Gómez.—Delegados de la Universala Esperanta Asocio: don Angel Digón y D. Antonio Tuduri.

La Esperantista Konsulo kaj Delegito de la Universala Esperanta Asocio en Carcagente, S.ro Domingo Talens, dissendis cirkulerojn anoncantajn la kursojn de

El Cónsul Esperantista y Delegado de la Universala Esperanto Asocio en Carcagente, D. Domingo Taléns, ha repartido unas circulares anunciando los

Esperanto de li farotajn en tiu urbeto. Ni dankas la ekzemplerojn al ni senditajn.

Estas citindaj la jenaj artikoloj ĵurnalaj:

En *El Nervión* de Bilbao, titolita *Esperantistaj Notoj; El Tiempo* de Murcia, kun la sama titolo, kaj subskribita de nia honora kaj honorinda prezidanto de Hispana Societo S.ro Codorniu; *La Mañana* de Cartagena, anoncante kurson de Esperanto en la lernejo direktata de S.ino Cristina Martínez Simón, y *La Crónica* de Guadalajara, proponante la fondigon de Grupo Esperantista.

cursos de Esperanto que ha de dar en dicha población. Agradecemos los ejemplares que nos han remitido.

Son dignos de nota los siguientes artículos periodísticos:

En *El Nervión* de Bilbao, titulado *Notas Esperantistas; El Tiempo* de Murcia con el mismo título y firmado por el honorable presidente de honor de Hispana Societo Sr. Codorníu; *La Mañana* de Cartagena, anunciando un curso de Esperanto en el colegio dirigido por doña Cristina Martínez Simón, y *La Crónica* de Guadalajara, proponiendo la fundación de un Grupo Esperantista.

De todas partes

En Inglaterra se han publicado durante los meses de agosto y septiembre unos excelentes Manuales de Esperanto, de la señorita M. Jones y del señor Mann, redactor de *British Esperantist.*—El Teniente Julio Laufberger, 98 inf. reg., *Hohenmanth*, Bohemia, nos escribe participándonos que el Esperanto cuenta con muchos adeptos en el ejército austriaco, y que quedaría agradecidísimo á cuantos camaradas de otros ejércitos quisiesen ayudarle en sus trabajos de propaganda.—El importante periódico ruso *Melodie Porivi* publica artículos en Esperanto.—Dos semanas antes del Congreso de Dresden, los esperantistas de los Estados Unidos de América, cuyo número ha aumentado con pasmosa rapidez en los últimos meses, celebraron su primer congreso nacional. Se reunieron en Chantanqua doscientos delegados; sobre la base de la antigua Amerika Esperanto Asocio, se fundó la Esperanto Asocio de Nordameriko que comprende á todos los grupos de los Estados Unidos y del Canadá. En otro lugar insertamos noticias sobre el quinto congreso internacional que se ha de celebrar el año próximo en la misma población.—El Sr. Berthelot ha introducido el estudio del Esperanto en las escuelas Berlitz de Río de Janeiro y Petropolis (Brasil).—En fin del corriente año, los esperantistas brasileños celebrarán su segundo congreso nacional de Esperanto.—En la República Argentina se ha constituído una sociedad para editar una Biblioteca esperanta sud-americana (Buenos Aires, apartado de Correos 737).—Para llenar el hueco que en la prensa esperantista ha dejado *La Belga Sonorilo*, se anuncia la publicación de una revista titulada *Belga Esperantisto.*—Han dado comienzo los 58 cursos anunciados para este invierno en París; este número de cursos que se dan actualmente en la capital de Francia, explica la propagación asombrosa del Esperanto en la vecina República.—La Esperanta Instituto, fundada en Dresden después del congreso, cuenta hoy cerca de 1.500 alumnos.—El primer congreso de esperantistas bohemios será organizado en el año 1909 por la asociación central *Bohema Unio Esperantista* de Praha (342, Ferdinandpva tr. 29).

* * *

Esperantistaj Gazetoj

I. Nacia Propagando

FRANCUJO: *L' Etoile Espérantiste*, monata gazeto, 16 paĝoj (25 × 32), en Esperanto kaj franca lingvo. Jara abono: en Francujo, 1,25 fr.; ekster Francujo 2 fr. (0,80 sm.). Administracio: «L' Etoile Esperantiste, 3, rue Sophie-Germain, *Paris.*»

FRANCUJO: *Paris Esperanto*, monata bulteno de la Pariza Grupo Espetista,ran 12 paĝoj (13,5 × 21) en Esperanto kaj franca lingvo. Jara abono: 1,50 fr. (660 sm.). Administracio: V. «Chaussegros, 3, place Jussieu, *Paris*».

GRANDA-BRITUJO: *The British Esperantist,* monata organo de la Brita Esperantista Asocio, 20 paĝoj (18 × 25), en Esperanto kaj angla lingvo. Jara abono: 3 ŝiling. (4 fr.; 1,50 sm.). Administracio: «S-ro Sekretario de la B. E. A., 133-136 High Holborn, *London*, W. C.

GERMANUJO: *Germana Esperantisto*, monata organo de la Germana Esperantista Societo, 12, paĝoj (18 × 24), en Esperanto kaj germana lingvo. Jara abono: 3 mark. (4 fr.; 1,50 sm.). Administracio: «Esperanto Verlaj Moller & Borel, 95, Prinzenstrasse, *Berlin*».

HISPANUJO: *Stelo Kataluna,* monata revuo pri scienco, arto kaj Esperanta movado, 19 paĝoj (19—28) en Esperanto, kataluna kaj hispana linjvoj. Jara abono: Hispanujo 2'50 fr. (1 sm.); ekster Hispanujo 3 fr. (1.20 sm.). Administracio: «Rambla S. Isidoro, Igualado, *Barcelona*».

HISPANUJO: *Tutmonda Espero,* ĉiumonata revuo, organo de la Kataluna Esperantistaro, 16, paĝoj (17—25) en Esperanto kaj kataluna lingvo. Jara abono 3 fr. (1,20 sm.). Administracio: «Paradis, 12, pral., *Barcelona.*

POLUJO: *Pola Esperantisto*, monata organo de polaj esperantistaj societoj, 16 paĝoj (20—28) en Esperanto kaj pola lingvo. Jara abono: 5 fr. (2 sm.) Administracio. «Hoza 40, m. 8, *Varsovia*».

SVISUJO: *Svisa Espero*, monata organo de la Svisa Esperanta Societo, 12 paĝoj (14 × 22) nur en Esperanto. Jara abono: 2,50 fr. (1 sm.) Administracio: «S-ro Th. Renard, 6, Vieux-College, *Geneve*».

FINLANDO: *Finna Esperantisto*, monata organo de la Esperanto Asocio de Finlando, 12 paĝoj (18×24), nur en Esperanto. Jar abono. 1,20 sm. Administracio: «Ilarejo Esperantista, Kopman str. 11, *Helsinki* (*Helsingfors)*».

BOHEMUJO: *Ĉasopis Ĉeskych Esperantistŭ* monata organo de la Bohemaj Esperantistoj, 16 paĝoj (13×20), en Esperanto kaj bohema lingvo. Jara abono: 3,75 fr. (1,50 sm.) por fremdlando; 3 K. por Aŭstrio. Administracio: «Ĉasopis Ĉeskych Esperantistŭ. *Praha*».

UNUIGITAJ ŜTATOJ: *The American Esperanto Journal*, monata organo de la Amerika Esperantista Asocio, 20 paĝoj (18×25), en Esperanto kaj angla lingvo. Jara abono: 1 dolar. (5 fr.; 2 sm). Administracio: «The American Esperanto Journal, Boulevard Station, *Boston*, Mass »

UNUIGITAJ ŜTATOJ: *Amerika Esperantisto*, monata gaceto, 16 paĝoj (13×23), en Esperanto kaj anglo lingvo. Jara abono: 1 dolar: (5 fr.; 2 sm.). Administracio: «Amerika Esperantisto, 1239, Michigan Avenue, *Chicago*».

PERUO, *Antañen Esperantistoj!!*, monata argano de la Perua Esperanta Societo, 12 paĝoj (17×25), en Esperanto kaj hispana lingvo. Jara abono: 3 fr.; (1,20 sm.). Administracio: «D-ro Federico Villarreal, Apartado 927, *Lima*».

BRAZILUJO: *Brazila Revuo Esperantista*, monata organo de la Brazilaj Esperantistoj, 32 paĝoj (15×23) en Esperanto kaj portugala lingvo. Jara abono: 6 fr. (2'40 sm.). Administracio: «Brazila Revuo Esperantista, Rua da Assembléa, 46, *Rio de Janeiro*».

CILUJO: *La Du Steloj*, monata organo de la Ĉila Esperantista Asocio, 28 paĝoj (17×26), en Esperanto kaj hispana lingvo. Jara abono: 5 fr. (2 sem.). Administracio: «Las dos Estrellas, calle de la Catedral, 1437, Casilla 727, *Santiago de Chile*».

JAPANUJO: *Japana Esperantisto*, monata organo de la Japana Esperantista Asocio, 20 paĝoj (19,5×26), en Esperanto kaj japana lingvo. Jara abono: 1,60 jen (4 fr. 1,60 sm.). Administracio: «Japana Esperantista Asocio Jurakĉo, Kiĵimaĉik, *Tokio*».

FILIPINAJ INSULOJ: *Filipina Esperantista*, monata organo de la Filipina Esperanta Asocio, 32 paĝoj (17,5×26) en Esperanto angla kaj hispana lingvoj. Jara abono: 2 P. (5 fr., 2 sm.). Administracio: «Philippines Esperanto Association, P. O. Box 326, *Manila*.

II. Generala Propagando kaj Literaturo

Lingvo Internacia; monata centra organo de la Esperantistoj, nur en Esperanto. 48 paĝoj (13 × 20), kun 16 paĝa literatura aldono.—Jara abono: 7,50 fr. (3 sm.) Administracio: «Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépede, *Paris*.

Juna Esperantisto, monata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj, 8 paĝoj (18 × 22), nur en Esperanto. Jara abono: 2,50 fr. (1 sm.). Administracio: «Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépede, *Paris*.

La Revuo, monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de D-ro Zamenhof, 48 paĝoj (16—24), nur en Esperanto. Jara abono: Francujo 6 fr. (2,40 sm.); ekster Grancujo 7 fr (2,80 sm.). Administracio: «Hachette & K^{io}, 79, Bd. St-Germain *Paris*.

Tra la Mondo, monata tutmonda revuo kun multaj ilustraĵoj (22—28), nur en Esperanto. Jara abono: 8 fr. (3,20 sm.). Administracio: «Gazeto Tra la Mondo, 15, Bd. des deux Gares, *Mendon* (S.-et-O.) France.

III. Specialaj Gazetoj

Esperanto, duonmonata internacia gazeto, organo de la Esperantistaj Konsulejoj kaj Oficejoj, 4 paĝoj (45 × 50), en Esperanto kaj diversaj naciaj lingvoj. Jara abono: 3 fr. (1,20 sm.). Helpabono: 10 fr. (4 sm.). Administracio: «S-ro H. Hodler, 8, rue Bovy-Lysberg, *Genéve*».

Internacia Scienca Revuo, oficiala monata organo de la Internacia Scienca Oficejo Esperantista, 32 paĝoj (17 × 26), nur en Esperanto. Jara abono: 7 fr. (2,75 sm.). Administracio: «Internacia Scienca Oficejo, 8, rue Bovy Lysberg, *Genéve*».

Espero Katolika, monata revuo por katolikoj, 32 paĝoj (14 × 22), nur en Esperanto. Jara abono: Francujo 4 fr. (1,60 sm.); ekster Francujo 5 fr. (2 sm.). Administracio: «Pastro Em. Peltier. *Sainte-Radegonde* (Indre-et-Loire) France.

Espero Pacifista, monata organo de la Societo «Pacifisto», (13 × 21), nur en Esperanto. Jara abono; 5 fr. (2 sm.). Administracio: «S-ro G. Moch, 26, rue de Chartres. *Neuilly* (Seine) France.

Internacia Socia Revuo, monata socia gazeto, 16 paĝoj (22 × 27), nur en Esperanto. Jara abono: 6 fr. (2,40 sm.). Administracio: «S-ro R. Lois, 45, rue de Saintonge, *Paris*».

Esperanta Ligilo, monata revuo presita en relief-punktoj Braille por Blinduloj, 28 paĝoj (14 × 23), nur en Esperanto. Jara abono: 3 fr. (1,20 sm.). Administracio: «S-ro Th. Cart, 12, rue Soufflot, *Paris*.

S.ro Benjamin Achútegui, (urbo *Calahorra*, provinco *Logroño*, *Hispanujo)* deziras korespondi esperante kun samideanoj de Londono kaj Nova Yorko.

Volas korespondi kun hispaninoj juna amerika soldato, kun nigraj haroj kaj okuloj, alta 1'85 metrojn, pezas 75 grammiloj, aminda personeco. Sin turni al E. L. Cropper, Company G, Eighth Cavalry, Fort Huachuca, Arizona, Unuigitaj Ŝtatoj.

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.